**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 30

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Tro saltas la ␣ ␣ **t** ␣ – ĝin kaptas la kato.

**2.** ␣ **pr** ␣ **t** ␣ vorto tentas, nenion atentas.

**3.** Feliĉon oni ne heredas nek ␣ **ed** ␣ ␣.

**4.** Zamenhof mistike ligis sian lingvon al iu homaranismo, tuj poste Lanti, en Sennacieca ␣ **s** ␣ **c** ␣ ␣ Tutmonda provis enkonduki alian ideologion, la sennaciismon.

**5.** La tuta jaĥto estas konstruita el ligno kaj oni uzis minimume 600 kg da gluaĵo kaj 50 kg da ␣ ␣ **rb** ␣ ␣ entute por ĝi.

**6.** Li forprenis la ĉapelon kaj forviŝis la ␣**v**␣ **t** ␣ ␣ per la stelumita naztuko kun surskribo “Esperanto”.

**7.** En cigarbutiko Sapulo vidis bele vestitan viron ekbruligi cigaron ĉe pendanta fajrilo, lasinte sian silkan ␣ **m** ␣ **r** ␣ **l** ␣ ␣ ĉe la enirejo.

**8.** La aktorino Angelina Jolie, unu el la plej popularaj kinartaj stelulinoj en Usono, surprize anoncis al la publiko, ke kirurgoj forigis ambaŭ ŝiajn ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣.

**9.** Ke ekzistas ␣ **r** ␣ **bl** ␣ **m** ␣ ␣ kun la financado de la sekureco koncedis ankaŭ la polica vicprezidanto.

**10.** Al utopiaj socialistoj ŝajnis, ke sufiĉas montri al homoj novan **s** ␣ **r** ␣ **n** ␣ ␣ vojon – kaj ili ĝoje iros laŭ tiu vojo.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** En ĉiu urbego, urbo aŭ vilaĝo, kie estas pavimo, ŝtona **t** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ **r** ␣ aŭ teraso, la tuta surfaco estas makulita de milionoj da tretitaj pecetoj da maĉgumo.

**2.** Norvega Junularo E-ista eldonis 3000 ekz-ojn de norveglingva **b** ␣ ␣ **ŝ** ␣ **r** ␣ pri la *Pasporta Servo*.

**3.** Mia konato kaptas serpentojn, kiujn li tenas en profunda, senakva puto kun alta **c** ␣ **m** ␣ **n** ␣ ␣ parieto.

**4.** La nacia kostumo de la finninoj konsistas el jupo, **b** ␣ ␣ **z** ␣ kaj veŝto, dum la kostumo de viroj konsistas el kuloto, ĉemizo kaj veŝto kun tranĉilo ĉe la zono.

**5.** Necesas semi pacience la **g** ␣ ␣ **j** **n** ␣ ␣ ␣, akvumi kun diligenteco la grundon, kie ili estas semitaj kaj lasi al la plantoj la tempon, kiu estas al ili propra.

**6.** EU ne kuraĝas kritiki la **k ␣ b ␣ n ␣ t ␣ ␣** de Silvio Berlusconi en Italio, kaj do Orbán sentas sin sufiĉe imuna kontraŭ EU-kritiko.

**7.** En la tutmonda "batalo" por la intelekta **k ␣ p ␣ t ␣ l ␣** Eŭropo perdas, ĝi ne plu ofertas alternativon al la anglalingva kaj usona hegemonio.

**8.** Dume la prezoj de importaĵoj inkluzive de **p ␣ tr␣ l ␣** kaj manĝaĵoj altiĝis kaj premis la vivon de la popolanoj.

**9.** Pentristoj komencis meti pli multe da farbo sur la kanvason kaj malglatigis la surfacon de pentraĵo per **p ␣ n ␣ k ␣** kaj paletra tranĉilo por fari tion, kion fotografiistoj ne povis fari.

**10.** La krimulo konata sub la kaŝnomo Maneto, estis jam alvokita antaŭ **t ␣ ␣ b ␣ n ␣ l ␣ ␣** pro kontraŭleĝa posedo de eksplodaĵoj kaj armiloj.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| trezor', funebr', abel', salon', butik', profesi', kugl', ebri', literatur', abomen'. |
|---|

**1.** Nur unu militospeco estas **␣ b ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ d ␣** kaj efektive pereiga: la enlanda, interfrata milito.

**2.** La plimulto de la **␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣** estas turkoj, ofte jam estas turkaj klientoj en la butiko, kiam mi envenas, kaj ili parolas inter si la turkan.

**3.** Kiam netolerebla tagmeza varmego igis nin serĉi kaŝejon, la majunulo venigis nin al sia **␣ b ␣ ␣ ␣ j ␣** en profundo de arbaro.

**4.** Japana filmo pri juna **␣ ␣ ␣ ␣ b ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ t ␣**, kiu iom post iom sentis fieron pri sia laboro, ricevis grandan aplaŭdon en 2008.

**5.** La urbeton Uĵi **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ m ␣ l ␣ ␣** konas kiel scenejon por la japana klasikaĵo de la 11a jarcento kaj la unua klasika "psikologia" romano – La Romano pri Genĵi.

**6.** La inspektistoj de Unuiĝintaj Nacioj trovis mustardan gason kaj **␣ ␣ g ␣ ␣ g ␣ ␣ ␣** kapablajn ĝin liveri.

**7.** Landa asocio devas esti pli **␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ c ␣** ol loka klubo kaj sur la internacia nivelo la postuloj estas ankoraŭ pli severaj.

**8.** Post diversaj klarigoj de oficisto, ni vizitis la ampleksan duoncirklan **␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ g ␣ ␣** de la Parlamentanoj kun pli ol 600 lokoj.

**9.** Alkoholo mem povas kaŭzi diversajn malsanojn, ekzemple kanceron kaj kronikan hepatiton, kaj krome **␣ b ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣** ofte estigas sociajn problemojn.

**10.** Unu fojon la postesignisto, ricevinte komision trovi ŝteliston, kiu ŝtelis juvelojn el la **␣ ␣ ␣ z ␣ ␣ ␣ j ␣** de la maharaĝo, iris laŭ la postesignoj de la krimulo ĝis la rivero Bias.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La solenaĵon sekvis dutaga scienca prelegaro, kiu en tri sekcioj ___ temojn el la laborkampoj de la fondita departemento.

**a.** ekskursis **b.** fandis **c.** traktis **d.** grimpis

**2.** Kiel poste rakontis al ni s-ino Tahira, unu ŝia konatino ___ dum la geedziĝo, pro la varmeco kaj la peruko.

**a.** konstatis **b.** svenis **c.** krevis **d.** dividis

**3.** Vergon oni ne bezonas, sed nur ___, fiŝŝnuron kaj la larvojn, aĉeteblajn en vendejo aŭ perpoŝte.

**a.** hokon **b.** ŝultron **c.** gradon **d.** registron

**4.** Laŭ la valida regularo estas malpermesite kloni bestojn en EU, tamen la nederlanda leĝaro ebligas ___ klonitajn, same kiel neklonitajn, bestojn el eksterlando.

**a.** murmuri **b.** peki **c.** odori **d.** importi

**5.** En la 9a-10a jarcento de nia erao la elstara irana kuracisto ar-Razi (Rhazes) unue sukcesis ___ morbilon de variolo.

**a.** ornami **b.** logi **c.** faldi **d.** distingi

**6.** Kulturon oni esprimas unuavice lingve, interkompreniĝo per la ___ studado de lingvoj daŭre konsidereblas kiel unu el la plej bonaj rimedoj por kunkonstrui kulturon de la paco.

**a.** lama **b.** kurioza **c.** blonda **d.** reciproka

**7.** Prezentita solvo, permesus venonte ŝpari signifan parton de Eŭrop-Unia buĝeto, ĝis nun destinita por tradukkostoj, kaj kiu povus esti destinita por aliaj pli ___ celoj.

**a.** noblaj **b.** acidaj **c.** vanaj **d.** ŝvitaj

**8.** Homo ofte estas kvazaŭ sorĉita de la naturo; dum li migras en maljunaj arbaregoj, lignopecoj kaj ___ "alparolas" lin.

**a.** tuboj **b.** poetoj **c.** stumpoj **d.** tabeloj

**9.** En la brusto de Marta la ĝis ekstremeco streĉita ___de sentoj krevis kaj eksonigis ribelan krion kaj suferplenan ĝemon.

**a.** tritiko **b.** zono **c.** kordo **d.** spaco

**10.** La tuta lando nun scias, ke dum pli ol dudek jaroj multaj el la plej influhavaj kaj riĉaj homoj profitis de eksterlandaj kontoj por kontraŭleĝe eviti ___.

**a.** brikon **b.** impostojn **c.** kaŭĉukon **d.** sukon